

BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 4a — Aprilo 1956a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

En la Europa Konsilantaro

Inaŭguro de nia Esperanto-ekspozicio
en Strasburgo

En la historio de Esperanto venis decida momento, ĉar la instancoj de la Eŭropa Konsilantaro nun oficiale okupiĝas pri nia internacia lingvo kiel ebla solvo de la eŭropa lingvo-problemo. Dum sia nuna sesio (de la 16a ĝis 21a de aprilo 1956) la Konsulta Asembleo decidis pri la de ni proponita Eksperimenta Instruado de Esperanto.

Tial oficiale subtenate de la Eŭropa Konsilantaro dum tiu tempo UEA prezentas imponan Esperanto-Ekspozicion en la Eŭropa Domo. Por vekti intereson kaj montri, ke Esperanto estas vivanta internacia idiomo multaj amikoj de unuigonta Eŭropo vizitas Strasburgon dum tiuj tagoj. Jenaj okazaĵoj estas aranĝataj.

Sabaton, la 14an de aprilo 1956

je la 15a: Inaŭguro de la Ekspozicio
je la 17a: Oficiala Akcepto ĉe la ĉefurbestro de Strasburgo
s-ro Atorfer

je la 20a: Amikara Vespero

Dimanĉon, la 15an de aprilo 1956

je la 10a: Vizito al la Ekspozicio
je la 15a: Popolfratiga Renkontiĝo
Prezidas: S-ro Levy, direktoro de la Informa fako ĉe la Ĝenerala Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro.

Prelegas: Sanoj Ferez, d-ro Herrmann, d-ro Lapenna, Laurat. Petit ktp.

Represo kaj korekto

En nia januaro numero, ni presigis la belan tradukon de S-ro H. Vermuyten, de la poezio de Guido Gezelle „Manjo.”

Ĉar en parto de la ekzempleroj, du linioj ne estis bone legeblaj, ni preferas represigi la tuton en tiu ĉi numero, sur paĝo 26.

Aliflanke, en la marta numero, la kompostisto malbone literigis la nomon de la

La kvara Beneluksa Kongreso en Gento

Nia 40a kaj jubilea Belga Kongreso

Iĝas nun vere tempo, ke ĉiuj ensendu sian aliĝilon por nia jubilea Kongreso, pri kiu ni, ĉi sube, donas ĉiujn oficialajn detalojn.

KONGRESKOMITATO

HONORAJ MEMBROJ:

S-oj A. MARIEN, *Provincestro*.
L. MERCHIEERS, *Urbestro*.

Loka Kongresa Komitato:

Prezidanto: S-ro G. De Boes
Vic-prezidantoj: S-oj E. de Wolf
J. Timmerman
Sekretariino: S-ino A. Gruslet
Kasistino: F-ino J. Terriijn
Anoj: S-ino B. Van Wanseele
S-ro V. Vanneste

EJOJ

Akceptejo, malfermo kaj vesperaj kunestoj: „Colombophile” — Prez.

Fr. Rooseveltslaan 6, (atingebla per tramo no 7 de la stacidomo)

Kunvenejo por RBLE — „Colombophile” (vidu supre)

Kunvenejo por FLLE — „Colombophile” (vidu supre)

Kunvenejo por LEEN — (dimanĉe)
Hotel de Londres — Graaf van Vlaanderenplein 5

Tagmanĝoj: Raadskelder (sub la Belfrido)

Katolika Diservo: Kapel, St Michielsstraat

Protestanta Diservo: Hervormde Kerk, Brabantdam

PROGRAMO

Sabaton, 19an de majo 1956

13.30a Malfermo de la akceptejo (Disdono de kongresaj dokumentoj)

16a Jarkunsido de Belga Esperanto — Instituto

17a Laborkunsido R.B.L.E.

aŭtore kaj tradukinto de la poezio „Patrino”, kiu estas në Willem Pollez, sed Willem Dollez, antverpena veterano.

La malnovuloj certe korektis. Por la aliaj, ni tamen preferas fari mem.

17.30a Laborkunsido FLLE.

18a Estrarkunveno de LEEN

20a Oficiala Malferma Kunsido

21a Promenado tra la urbo por vidi la iluminitajn monumentojn

Kunveno por la anoj de FLEI.

22a Aĝrabla kunesto kun diversaj amuzajoj

Dimanĉon 20an de majo

9a Malfermo de la akceptejo ĝis la 11a

8.45a Protestanta Diservo (Hervormde Kerk — Brabantdam) prizorgos W. H. Koopmans

9a Diservo por Katolikoj (Kapel St Amandus Instituut — St Michielsstraat) kun prediko de pastro J. De Maeve

10a por la respektivaj membroj, Jarkunvenoj por

1/ FLLE en Colombophile

2/ R.B.L.E. en Colombophile

3/ LEEN en Hotel de Londres

11.30a Akcepto de la kongresanoj en la urbdomo kaj

Vizito al en la urbdomo (ĉiuj nepre portu la kongresinsignon)

12.30a Fotografado (Universitato)

13.30a Komuna tagmanĝo en „Raadskelder”

15.30a Promenado tra malnova Gento

16a Daŭrigo de la Jarkunveno de LEEN

20a Festvespero

Lundon 21an de majo

9.30a Kunveno ĉe „Colombophile” por Vizitoj — en diversaj grupoj — kaj laŭ elekto — al:

1/ Botanika ĝardeno

2/ Grafa Kastelo

3/ Bijloke muzeo

12.30a Komuna tagmanĝo en „Raadskelder”

14a Vizito al la Muzeo pri Folklore kaj ĉeesto de marioneta ludo

16.30a Adiaŭo kaj aĝrabla kunesto por tiuj kiuj povas resti pli longtempe en „Colombophile”

Mallonga Historia Skizo pri la urbo GENT

(sekvo)

4) Inter Mez- kaj Moderna Epoko.

Oni povas ofte legi en malnovaj historiaj libroj pri niaj „grandaj“ mezepokaj urboj Brugge kaj Gent ke ili havis pli ol 200.000 enloĝantojn, dum ke nuntempe la unua havas la kvaronon, kaj la dua la duonon de tiu nombro. Fakte Gent havis certe neniam pli ol 50.000 ĝis maksimume 60.000 urbanojn. Tiuj skribintoj ne sufiĉe konsideris ke interne de la fortikaĵoj restis grandaj tersurfacoj por kulturado kaj paŝtado.


Kun la dek-kvina jarcento alvenis por Gent, kiel cetero por ĉiuj aliaj urboj, tute alispeca periodo. La Gentanoj mem tiu tempe ne komprenis tion. En tiu jarcento la Grafo-kaj Dukolandoj malaperis. Ekestis la grandaj unuigitaj regnoj. Politika povo de la nobelularo kaj de la burĝaro mal-kreskis favore al tiu de la reĝo. La „Nederlandoj“ estis akaparataj de la dukoj de Burgundio. Unue Filipo, frato de la franca reĝo, iĝis grafo de Flandrujo sekve de la geedziĝo kun Margareta de Male. Li venis al Flandrujo kun ŝajne 100.000 soldatoj. Kiu urbo estus povinta kontraŭstari tian forton? Li kaj liaj posteuloj neniigis la privilegiojn kaj starigis centrajn administrantarojn por anstataŭi la lokajn. Kompreneble, la urbanoj luktis kiel mortminacato luktas. Neniu urbo de la Nederlandoj luktis tiel akre, ĝis kompleta elĉerpiĝo, kiel Gent. Plej konata estas la lukto inter Gent kaj Filipo la Bona. Tiu lasta volis havi regule envenantan imposton kaj ne plu la neregulan kiu sekvis post la kutima Grafa „Petego“. Li elektis por tio la salon. La Gentanoj ribelis kaj mortigis la kelkajn urbanojn kiuj favoris Filipon. La fina batalo okazis en Gaver kie Gent perdis ŝajne 16.000 virojn. (23 Julio 1453). Post Filipo la Bona, Karlo la Maltima regis. Je lia solena enveno en Gent, ties burĝoj denove ribelis, postulis siajn antaŭajn privilegiojn, tiel ke la duko devis batalante liberigi la vojojn por foriri. Sekve de tio, la skabenaro nun dependis de la elekto de la duko mem. La lasta fortostreĉo de Gent okazis sub la regno de imperiestro Karlo Va kiu naskiĝis en Gent mem (en la Princo-Korto 29 Feb. 1500). En tiu tempo Gent estis ekonomie falinta urbo. Nur unu metio ankoraŭ iom prosperis: tiu de la Sispistoj. Ilia kunvenloko, en 1543 konstruita laŭ la Graslei (Herbokajo) estis la lasta luksa metidomo. Antwerpen, kie estis preskaŭ kompleta libereco de komerco, transprenis la prosperon de la urboj Gent kaj Brugge, kie ĉiu ekonomia agado estis katene

reguligita. Pro la grandega mizero la Genta urbestro rifuzis la imperiestran peton por imposto. Li estis tiam en Hispanujo. Sed tuj li revenis; fermigis la pordegojn de la urbo kaj komencis la punagon. Parte la fortikaĵoj estis detrinitaj; la ĉefoj devis veni al la merkato-placo kaj, en ĉemizo, nudpiede, ili devis peti pardonon. Ili portis ŝnuron ĉirkaŭ la kolo. De tiam la Gentanoj portas la kromnomon: la ŝnurportistoj. Ĉiuj privilegioj ankoraŭ ekzistantaj estis nuligitaj. Gent estis depost tiam nur provinco-urbo.

16a jarcento: sama ekonomia malprospero. Sed alia sufero trafis la urbon: la religio-militoj. Calvinistoj predikis la reformitan religion. Ilia predikado despli trafis ĉar dum ke grandaj homamasoj vivis en mizero, la ekleziularo vivis en lukso. Plej teruraj punoj estis destinitaj por an(in)oj de la Protestantismo. La okupanta hispana soldataro, kontraŭe, rajtis senpune kondukti kiel bestoj. Precipe depost Filipo IIa sekvis sian patron Karlo Va, la situacio tre malboniĝis. Je iu momento, la urbestro venis en la manojn de la Calvinista malplimulto. Tuj, preĝejoj estis fermataj aŭ pretigitaj kiel arsenalo (Sta Jakobo), kiel grenejo (Sta Bavo), kiel kazerno (Sta Nikolao kaj Mikaelo). Religioj devis forlasi la urbon. Sed fine Aleksandro Farnese rekonkeris la urbon. Li estis por tiu tempo certe ekstreme tolerema. Tre multaj Gentanoj elmigris al Nord-Nederlandoj. Estis ĉiuj la plej agemaj kaj plej entreprenemaj personoj. Cetero Nord-Nederlandoj grave profitis el tio. En la Sudo oni iniciatis la Katolikan reorganizon kun multaj manifestacioj, solenaĵoj, Diservoj, inaŭguroj ktp. kaj kun kompreneble la necesa kontrolo. Por la jaro 1629 oni kalkulis ne malpli ol 31 monaĥinejojn; sole en Gent!

La 17a jarcento estis periodo de daŭrantaj internaciaj militoj el kiuj multaj havis nian landon kiel scenejon. Dum kelkaj jaroj de paco post 1659 oni rekonstruis en Gent domojn, kajojn kaj oni pavimis la stratojn. De 1666 datumas dusemajna poŝtveturilo Gent-Brussel. La sekvanta jaro vidis la aperon de „Gentsche Post-tijdinghe“ (Gentaj Poŝtsciigoj) kiu iĝis poste la „Gazette van Gent“ (Gazeto de Gent) kaj kiu ĝis antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ ekzistis. Ĉirkaŭ la jaro 1700 Gent konis la okupadon de Francoj kaj poste de Angloj.

La 18a jarcento kontraŭe estis longa epoko de paco kun escepto de la



Manjo

(Mietje)


GUIDO GEZELLE (1830-1899)

Manjo, svelta grentunket',
nudpiede, trete,
lakton portas en pelvet',
dolĉe, dolĉ-dolĉete,
atentante nur pri l'trakt',
tre singarde, de la lakt'.

„Manjo“, aŭdis la knabin',
„bonan tagon“, ne divenis
kiu dolĉ-parolis ŝin
kaj kaptunis kaj ĉagrenis:
falas lakt' sur nudpied',
kiu vokis...jen sekret'!

Manjo, vigla Manjo, se
lakton nudpiede
portas vi, atentu tre:
dolĉe, dolĉ-dolĉete
se vi ion aŭdas, nu
ne kaptunu tiam plu!

trad. H. Vermuyten



jaroj 1746-8. Tamen nur en la dua duono de tiu jarcento, ni havas rimarkindan periodon, sub la regado de la Aŭstria imperiestrino Maria-Theresia. En tiu tempo oni interligis la Leie-riveron kun la kanalo Gent-Brugge-Oostende per la „Coupure“ (litere: la tranĉo). La periodo estas ekonomie interesa pro la efektivigo de kanaloj kaj vojoj kaj la starigon de industrioj. Ĝis tiu tempo, ĉiu industrio estis hejm-industrio. Sed tiam ekestis la unuaj pli grandaj industrio-domoj (fabrikoj?) kun 60 ĝis 90 laboristoj. En Gent estis la laborejoj pri kotono. Malgraŭ tio, la malriĉeco estis ankoraŭ tiel granda ke en 1772-5 oni konstruis la „Rasphuis“ por doni subtenon kaj laboron.

Lasta vorto por fini tiun kronikparton. La franca lingvo kaj kulturo, kiuj ĉiam havis tre grandan influon en nia lando, ankaŭ ekz. ĉe la korto de la Flandraj Grafoj, nun trafenetris ankaŭ la burĝaron. Tio ankoraŭ pliiĝos sub Napoleono. Sed krom ekonomia baro kiu disigis la klasojn de la socleo, nun ankaŭ kultura, lingva, baro intervenis.

(daŭrigota)

Fernand Roose

LA MAMSUĈANTO

Laŭ „GENTIANEN“ - (legendaro)

Sinjoroj trompitaĵ,
Muroj trasuĉitaĵ,
Kies infano estis
Ties patrino iĝis?
(malnova genta enigmo)



Lam post kiam la Gentanoj ree foje ribelis kontraŭ sia grafo kaj por la tioma fojo malsukcesis, la tirano postulis ke minimume unu el la ĉefoj de la urbo mortu terure.

La reganto postulis nepre la malsat-morton por la koncerna estro en la urba malliberejo.

La burĝoj kiuj regis la urbon, devis inter si nur decidi kiu estos la prokulpa ofero. La urbjuĝisto estis maljuna sed saĝa kaj kuraĝa. Miaj kruroj ne plu longtempe portos min. Vi, kiuj estas miaj amikoj, ankoraŭ multon povas esperi de la vivo, mi ne plu. Tial lasu min morti por vi kaj nia bona urbo. Mia edzino, kiun mi tiom amegis, estas en la ĉielo. Ĉar mi esperas revidi ŝin tie kun Difavoro, ne estos al mi peniga forlasi la vivon.” Multaj junuloj estis tro fieraj por toleri la viktimitigon de la grandaĝulo kaj postulis ke oni mortigu ilin. Sed

la urbjuĝisto insistis kaj finfine oni konigis lian decidon al la grafo. En ĉiuj kvartalaj de la urbo oni laŭde parolis pri la kuraĝa viro kiu, sen plendo, lasis sin enfermi por fini sian vivon; tagoj kiuj estos plenigitaj de malsat-sufero.

Kiam la maljunulo estis sola en la karcero kaj sciante ke neniu povos ion vidi, tiam li ploregis. Kaj ne estis pro si mem, sed ĉar li ne plu vidis la infanon de sia ununura filino. La etulo estis nur dusemajnojn aĝa.

La reganto esperis ke tia maljunulo ne longtempe povos resti sen nutraĵo. Sed tagoj sinsekvis kaj ankaŭ semajnoj kaj la grandaĝulo plu vivis.

Tiam li ordonis enketon. La sola kiu interrilatis kun la enkarcerigito estis lia filino. Ŝi ofte venis paroli kun li tra la kradoj de la karcero. Ĉiam oni palpserĉis sed neniam oni trovis ian nutraĵon ĉe ŝi. Evidentiĝis

Lingvaj studoj en universitatoj

El diversaj landoj oni anoncas, ke pluraj universitatoj enkondukis la instruadon de Esperanto. En la pasinta jaro formiĝis lektorato de Esperanto en la Ekonomia Fakultato de la Universitato en Zagreb (docento D-ro Ivo Borovečki). En tiu ĉi studjaro komenciĝis libervola kurso de la Internacia Lingvo ĉe la Fakultato de Ekonomio kaj komerco en la Universitato de Parma. La kurson gvidas Prof. D-ro G. Canuto, Rektoro de la Universitato mem.

La 3-an de oktobro estis solene malfermita la lektorato de Esperanto en la Universitato „Kliment Ohridski“ en Sofia. La lekcionoj enskribis 65 studentoj, kiujn instruas Prof. Stojan Guĝev. La ŝtata Jagiellona Universitato en Krakow restarigis la katedron de Esperanto la 14-an de oktobro. Tiu katedro ne funkciis dum kelkaj jaroj, sed nun ĝi denove estas malfermita. La Esperanto-lekcionoj enskribis 52 studentoj el diversaj fakultatoj. Instruas Prof. Mieczyslaw Sigmarski. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, en la urbo Hradec Kralové la Ekonomia Lernejo aranĝis Esperanto-kurson por la studentoj. Entute pli ol 30 universitatoj de diversaj landoj nun havas katedrojn aŭ lektoratojn de Esperanto.

Gramofondisko dediĉita al UNESKO

La plej belaj artoj kaj ductoj el la mondfama opero „La Vendita Fianĉino“ de B. Smetana ĵus aperis sur gramofondiskoj en Esperanto. La diskoj estas publikigitaj en Ĉeĥoslovakio kaj dediĉitaj al Esperanto-fako de Radio-Roma kaj al UNESKO okaze de la Unua datreveno de la fama Rezolucio de UNESKO pri Esperanto. La solistoj estas Zdenek Švehla, tenoro, D. Královčová, soprano kaj Fr. Panoš, pianisto, ĉiuj membroj de la opero en Olomouc. La diskojn unue disaŭdigas Radio-Roma.

do ke ŝi ne alportas manĝaĵon al la patro.

Fine oni decidis spioni kiam ili duope parolos kaj tiam oni vidis la kortuŝan scenon kiu samtempe alportis la klarigon pri la mirakla ĝisvivo de la maljunulo. La filino nutris sian maljunan patron el siaj plenaj mamoj, kiuj ankaŭ nutris ŝian etulon.

La konstatojn tuj la spionoj sciigis al la estro. Ĉi tiu, trafite de tia heroo infanamo, ordonis ne sole la liberigon de la kondamnito, sed kiel eternan memoraĵon al tiu mirinda okazaĵo, li metigis super la enirejo de la urba malliberejo la bareliefon kiun la Gentanoj ankoraŭ ĉiam montras sub la nomo de „Mammelokker“ (mamsuĉanto).

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Rega Belga Ligo Esperantista

La ĝenerala jarkunsido

Sabaton, la 7an de aprilo, je la 16a, okazis en Bruselo, en la salono de „Brasserie de la Justice“, Justeca Placo, la ĝenerala jarkunsido de nia Ligo, kiun prezidis S-ro Maur. Jaumotte, ĉirkaŭata de la membroj de la estraro kaj de la administrantaro.

S-ro Soyeur, vicprezidanto-kasisto, prezentis la raporton de la administrantaro, kiun la ĉeestantoj aprobis per aplaŭdoj.

La bilanco pri la jaro 1955a ekvilibriĝis plene, se oni apartigas la elspezojn esceptajn, kiuj rilatas al la festo de nia jubileo kaj al la honorigo de niaj veteranoj kaj jubileantoj.

Ĝi estis aprobata, same kiel la budĝeto por 1956a, kiun la estraro prezentis kaj kiu antaŭvidas sanan egalligon de niaj en- kaj elspezoj.

Poste okazis la kompletigo de la administrantaro, laŭ la novaj grupaj rajtoj:

La laŭrajtaj administrantoj estas: S-roj M. Jaumotte, P. Kempeneers, F. Mathieux kaj G. Van den Bossche.

La grupaj delegitoj estas:

Antverpeno: S-roj H. Sielens, J. Verstraeten, M. De Ketelaere.

Brugo: S-roj Ch. Poupeye, D. De Meulenaere.

Bruselo: S-ro R. Jacobs, S-ino M. Weyn.

Gento: S-ino C. Vandeveld.

Lieĝo: S-ro J. Desonay.

Verviers: S-ro J. Koeune.

Charleroi kaj izoluloj: S-ro R. Paulus.

Kiel kooptaj administrantoj: estis

reelektataj S-ino J. Plyson; S-roj J. Soyeur kaj Th. Van Gindertaelen.

Ĉiuj administrantoj estis unuanime elektataj same kiel la komisarioj: S-roj Alofs kaj Everaerts kaj F-ino Obozinski, nova komisarino.

Laŭ posta decido de la administrantaro, la estraro restos kiel indikata en la ĉi supra kadreto.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

En nia antaŭa numero forfalis paragrafo rilate al la solena diplomdisdono al la ĝelernintoj de la vintra kurso kaj kiu okazis, la 17an de februaro, dum la unua parto de la kunveno.

Kiel kutime la Prezidanto S-ro M. Jaumotte alparolis la ĝediplomotojn kaj substreki la necescon de la daŭra studado kaj praktiko de la lingvo. Li ne forgesis la profesoron, S-ron M. De Ketelaere, kaj dankis lin por la nelacigebla laboro farita kaj lia ĉiama daŭra sindono al Esperanto. Sekvis tiam la diplomdisdono. Sukcesis en la ekzameno: (plej granda merito): F-ino Eveline van den Neste; (granda merito): S-ino Fr. van den Neste; (merito): S-roj A. van den Neste, G. Maes, Fr. De Weerd; (sukceso): S-ro J. Haveau. Nome de la ĝediplomitoj S-ino Fr. van den Neste elparolis bonegan paroladeton, en kiu ŝi esprimis sian dankon al la profesoro, tiel denove pruvante ke Esperanto efektive estas lingvo, kiun oni povas paroli eĉ post nur 15 lecionoj. Donaco estis transdonata al la profesoro, kiu per varmaj vortoj dankis kaj samtempe instigis al vigla studado. Por esprimi sian dankon al la grupo kaj al la prezidanto, la ĝelernintoj, fare de F-ino Eveline van den Neste, transdonis belajn florojn al la Prezidant-edzino.

La 23an de marto la kabareta vespero estis prezentata kun brila sukceso. Por plibonigo de la prezentado zorgis S-ro A. Van Dessel, nova membro, per plej trafa lumigado de la scenejo. Skeĉoj, kantoj, deklamado kaj muzikaj alturniĝis kaj kreis tian distran atmosferon en kiu la vidantaro forgesas siajn ĉiutagajn zorgojn kaj ĝuas la agreblajn flankojn de la vivo. La publiko alte taksis la prezentadon kaj varme aplaŭ-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

dis la geaktorojn, al kiuj la Prezidanto S-ro M. Jaumotte, eldiris sian kaj ĝian dankon. Kunlaboris al tiu sukceso: F-inoj J. kaj M. Ameryckx (viglaj kiel ĉiam), L. De Winter (kiu pli kaj pli sukcesplene kunlaboras), C. Peeters (ne plibonigebla ĉe la piano) kaj L. Vinck (ĉiam fidele deĵoranta malantaŭ la kulisoj); S-roj K. Ameryckx (la nelacigebla kantisto), Fr. Schellekens (kiu iĝas pli kaj pli ĉefaktoro), W. Van Nereaux (kiu sin movas sur la scenejo kiel en sia hejmo), J. Vinck (ree kaj fidele aktiva post sia milita servo kaj prizorganto de la bel-kaj novaspektaj programoj), J. Montmirail (fleganto de la sondekoro) kaj J. Verstraeten (la paroladisto). Speciale menciinda estas S-ro P. Peelman, la reĝisoro kaj tradukanto de melodio el „Tsarevitch“ kaj nelacigebla kantisto de „schlager“-kantoj. Entute estis bonega vespero kies dumonata prezentado akiras en la grupa programo specialan allogan famon.

La 30an, dum la Sankta Vendredo kaj honore al Pasko, malgranda manĝaĵo, kukoj kun kafo, estis donacata al la membroj. En tiu speciala atmosfero, S-ro K. Ameryckx prelegis pri la ekesto kaj la diversaj kutimoj de Pasko en multaj landoj de la mondo. Li akiris varman aplaŭdon, same kiel la tombolo, kiu estis aranĝata de F-ino L. De Winter kaj por kiu la membroj alportis premiojn kun paska aspekto. Por konkludi en agrebla atmosfero oni kune kantis la „Kanto(n) de la Verda Stelo“, laŭ teksto de F-ino H. Hofkens kaj muziko de S-ro G. Debacker, ambaŭ membroj. S-ro K. Ameryckx antaŭkantis kaj F-ino Eveline van den Neste akompanis ĉe la piano. Tekstoj de la kanto kun muziko, donaco de S-ro G. Debacker, estis vendataj je profito de la kaso.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijk 4, je la 20.30a h. (la etaĝo).

Aprilo: (memorige): la 13an: Parolado de S-ino L. Merckx pri „Koloniaj Pioniroj“; La 20an: Amuza Vespero; La 27an: Parolado kun lumbildoj de S-ro A. Verhoeven, pri la malsanulejo „Sankta E-

Nekrologo

S-ino Elworthy-Posenaer

Dimanĉon, la 25an de marto matene, nia malnova kaj bona amikino S-ino Elworthy-Posenaer ne plu vekigis. Ŝi trovis sin, jam mortintan, en ŝia lito en la Sta. Augustin-Instituto de Antverpeno.

La enterigo okazis en intima familia rondo kaj la informleteroj, forsenditaj post la ceremonio, citis sub la nomo de la mortinto la titolon:

„Zélatrice de l'Esperanto“

„Ieveraarster voor Esperanto“

sen kiu ajn alia indiko.

Kaj vere, nenia titolo, pli bone ol tiu ĉi, povus klarigi pli ĝuste la rolon, kiun S-ino Elworthy ludis en nia movado.

Krom la membreco, en 1911 kaj 1928, de la L.K.K. por la 7a kaj 20a Universalaj Kongresoj en Antverpeno, ŝi neniam akceptis iun postenon en la movado, kvankam ŝi tamen, dum multaj jaroj, estis konstanta komitatano de Belga Ligo.

Sed ŝi preterlasis nenian okazon por atentigi la oficialajn instancojn kaj la publikon pri nia afero per trafaj artikoloj en tagajurnaloj, i.a. en „Le Matin“, kiu mem memorigis, okaze de ŝia morto, pri la fakto ke ŝi estis ĝia kunlaborantino por Esperanto.

En la numero de decembro 1954a de nia revuo, aperis, — kiel unua en la vico de pri-veteranaj artikoloj —, detala priskribo de ŝia vivo, grandparte dediĉita al Esperanto.

Ni tiam memorigis pri ŝiaj unuaj paŝoj en 1906 en la movado; pri ŝia ĉeesto de multaj el la unuaj universalaj kongresoj:

lisabeth“.

Majo: la 4an: 2a E.K.I.-vespero: „Meksio“, parolado kun lumbildoj de S-ro Fr. Van Doren; Jaŭdon, la 10an (ĉieliran tagon): Ekskurso al Bouwel; La 11an: Parolado de S-ino R. Lecat, pri „Albert Einstein“; la 18an: Kabareta Vespero; la 19an, 20an kaj 21an: partopreno al la Kongreso en Gento; la 25an: Raporto pri tiu ĉi kongreso.

Kondolencoj

iras al G-roj Remy Van Eynde, fidelaj gemembroj de la Grupo, okaze de la morto de ilia patro kaj bopatro, S-ro J. L. Van Eynde, kiu mortis 88-jara en Berchem, la 22an de marto.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 48.5.33)

La kunveno de la 13a de marto estis la lasta de tiu ĉi sezono, kiu okazis en „Cornet d'Or“ kaj estis ĉefe dediĉata al

pri ŝia beletristika laboro kaj speciale pri ŝia bela traduko, —rekompencita en 1914 de la Esperanta Akademio —, de „Rikke-Tikke-Tak“ de H. Conscience.

Multaj el la novuloj en nia movado ne plu konis ŝin, ĉar ŝi kuŝis, de kelkaj jaroj, lamigita en seĝego aŭ lito. Sed ĉiuj veteranoj kaj antaŭmilitaj esperantistoj memoros, kun emocio, tiun vere bonan amikino.

Ni rediras tie ĉi la kondolencojn, kiujn R.B.L.E. jam sendis al la familianoj kaj speciale al la frato de la mortinto.

Ke la tero estu dolĉa al ŝi, kiu ĉiam estis dolĉa al ĉiuj!

S-ro Edgard De Cester

Subite mortis en Antverpeno, 66-jar-aĝa S-ro Edgard De Cester, kiu dum multaj jaroj estis kasisto de „La Verda Stelo“ kaj reprezentis sian grupon en la komitato de Belga Ligo.

Li estis malnova esperantisto, kiu, jam antaŭ la unua milito, aliĝis al la intertempe malaperinta „Antverpena Grupo Esperantista“.

Malkuraĝigita pro malbona sanstato, li forlasis niajn rangojn antaŭ kelkaj jaroj, tiel ke la novuloj ankaŭ lin ne plu konis.

Sed multaj malnovaj esperantistoj amike memoros lin, kiu dum sia longa kasista aktiveco, estis ne nur obstina varbanto, sed ankaŭ fidela kunlaboranto.

La prezidanto de nia Ligo kaj de la antverpena sekcio, kun kelkaj amikoj ĉeestis, pasklunde, la enterigon kaj prezentis al liaj filo kaj fratino la kondolencojn de la esperantistoj.

preparo de la nova kurso.

Tiu nova kurso, sub gvidado de la prezidanto S-ro Ch. Poupeye, komenciĝis la 20-an de marto en la provizora kunveno „Concordia“. Tre kontentiga nombro de novaj ĝelernantoj enskribiĝis kaj plie ĝin sekvas, kiel utila ripetado, pluraj lernintoj de pasintaj kursoj. Tuj post la unua leciono okazis la kutima interkonatigo inter la novaj ĝelernantoj kaj la aliaj gemembroj.

La dua leciono estis donata la 27an de marto kaj dum la postleciono kunveno S-ro Van Hecke parolis pri perkoresponda kurso de Esperanto, post kio la novuloj ricevis unuan specimemon de paroliga kaj amuza portretludado.

Ĉu estas am'?

En mia kor'vibradas stranga sento,
Tra mia kor'sorĉologas flagra flam',
Flamo enigma, ĉu amsentimento?
Ne, mi deliras, ĝi ne estas am'.

Ĉe mia kor'ŝveligas stranga larmo,
Lin mi ofendis. Ve, li min evitas,
Ĉu inter ni do rompiĝas la ĉarmo?
Teda ĉagren'miajn manojn agitas.

Kiel ekspliki? Nur frivola absurdo?
Ĉu ne malbena stult'? Malbena erar'?
Ridu, mi vagas kun kora perturbo
Plende pentante pro neebila ripar'.

En mia gorĝ' sopiroj nun doloras,
Ĉu ĝis revido? Longaj mornaj tagoj.
Sed post bedaŭro espero fluoras
Tra labirinto de tristaj imagoj.

Ĉu pro konfuz'mi sence ĉagrenas?
Ĉu mi nur sonĝis? Ĉu ĉi

turment'nur ŝerc'?
Hh...Pro rea feliĉo mi preskaŭ svenas
Sentante la ĉarmon en rea konverĝ'.

Kaj ĉe mia koro duoblas la flam',
Mi ne scias diri ĉu ĝi estas am'.

Anna Meurrens

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

ATENTU, GRAVA SANGO: Ek de la 20-a de marto ĝis septembro, pro ne disponebleco de granda salono en nia sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or“, la kunvenoj kaj lecionoj okazos ĉiumarde, je la 20-a, en provizora kunveno: „CONCORDIA“ Zuidzandstr. 5, Tel. 366.24, salono je la 1-a etaĝo, dekstre.

Majo: (memorige): la 1an: Laborfesto kunveno ne okazos; la 2an: (merkredon) a) leciono; b) muzika vespero; la 8an: a) leciono; b) raportado pri la kermesa foiro; la 15an: a) leciono; b) lastaj aranĝoj por la Beneluksa Kongreso en Gento; la 19-20-21ajn: 4a Beneluksa Kongreso; la 22an: a) leciono; b) raportado pri la kongreso; la 29an: a) leciono; b) parolata gazeto.

Junio: ĉiumarde, je la 20a: a) leciono; b) kunveno kun komunikadoj kaj paroligaj ekzercoj.

(Sekvo de la Kroniko sur paĝo 32).

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

41-a Universala Kongreso de Esperanto

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

OFICIALA KOMUNIKO

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

NOVA FAKKUNVENO: Anoncis sin Akademio de Esperanto, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

TUTTAGAJ EKSURSOJ: Estas aranĝitaj: per ŝipoj en Öresund kun vizito en Helsingborg, Svedujo, per aŭtobusoj al Nordselando kun vizito en Helsingör, kaj al Sudselando kun vizito en Mön.

POSTKONGRESAJ EKSURSOJ: Okazos 5-taga ŝip-kaj aŭtobusveturado tra Danlando, kaj 6-taga aŭtobusveturado tra Svedujo.

KOTIZO: Ek de la 1-a de aprilo la kotizo estos danaj kronoj 48.—, edzino 24.—, gejunuloj 16.—, studentoj 24.—. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7.—, edzino de kongresano 3,50.

TEATRAJO: Teatra Grupo en Kopenhago prezentos dum la Kongreso tri unuaktajn teatraĵojn en Esperanto de Soja, Leck Fischer, Sven Clausen. La tri verkoj donos kompletan bildon de la moderna, dana dramatikio.

UNIVERSALA EKSPozICIO DE ESPERANTO: Ĝi okazos en Kopenhago dum la kongresa semajno por doni la eblecon al la esperantistoj kaj al la publiko koni ĝian valoran enhavon.

GAZETARA SERVO: Ĝi jam ekfunkciis per tri branĉoj kaj laŭ modernaj konceptoj por informadi la eksterlandan, enlandan kaj esperantistan gazetaron.

DUA BULTENO: Ĝi estas sendita al ĉiuj aliĝintoj, aldone troviĝas Logiga Plano kaj Ekskursi Programo.

HONORA KOMITATO: La Ĉefministro de Danlando, H. C. Hansen, akceptis esti Protektanto de la 41-a Universala Kongreso. La Ministro por Instruado, Julius Bomholt, estas Prezidanto de la Honora Komitato.

STATISTIKO: (ĝis fino de februaro): Algerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 9, Belgujo 6, Brazilo 2, Britujo 144, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 214, Finnlando 60, Francujo 115, Germanujo 87, Hispanujo 10, Islando 21, Izraelo 1, Italujo 99, Jugoslavio 59, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 7, Meksikio 1, Nederlando 54, Norda Rodezio 1, Norvegujo 55, Novzelando 1, Portugalujo 2, Svedujo 196, Svisujo 21, Turkujo 2, Usono 9, Venezuelo 1.
Sumo: 1161 el 33 landoj (pasintjare 937 el 27 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

Fondaĵo Universala Ekspozicio

Estas konate, ke la granda Universala Ekspozicio, aranĝita en Nov./Dec. 1954 en Montevideo okaze de la Generala Konferenco de UNESKO, brile sukcesis. Ĝi altiris la atenton ne nur de diversaj delegacioj, sed ankaŭ de la larĝa publiko. Tiu ekspozicio estis kaj estas la plej laŭta dokumento pri la akiraĵoj kaj kulturaj valoroj de la Internacia Lingvo.

En la momento, kiam vi legas tiujn ĉi liniojn, la ekspozicio jam troviĝas survoje al Eŭropo. Okaze de la sekvanta Sesio de la Eŭropaj Konsulta Asembleco en Strasbourĝ, ĝi estos prezentata al la Eŭropaj reprezentantoj kaj al la publiko en la Eŭropo-

Domo. Estas superflue akcenti la eksterordinaran gravecon de tiu fakto. Poste la ekspozicio estos prezentata en diversaj aliaj urboj de Eŭropo.

La elspezoj por la transporto kaj aranĝado de la ekspozicio estas konsiderindaj. La estraro de U.E.A. dum sia lasta kunsido voĉdonis subvencion de f 100.— sed tiu sumo povas kovri nur relative malgrandan parton de la kostoj. Tial la Estraro decidis formi specialan fondadon sub la nomo „Fondado Universala Ekspozicio” kaj peti la esperantistaron finance kontribui al tiu fondaĵo. La donacojn por tiu celo oni povas sendi al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A. en diversaj

En U.E.A.

KAMPANJO POR APOGANTOJ

Laŭ la nova stauto (par. 12) kaj ĝenerala regularo (par. 3), Apoganto estas persono, kiu apogas la celojn de UEA kaj kiu pagas unufoje por ĉiam kotizon, difinitan de la Komitato. Tiu kotizo estas fiksita kiel baza kotizo je 5 ned. guldenoj. La kotizoj por la aliaj landoj estas proksimume adekvataj al tiu baza kotizo, sed ne precize egalaj, ĉar pro praktikaj kaj psikologiaj kaŭzoj montriĝis necese havi rondajn ciferojn. Tiel, ekz., la kotizo por Francaj teritorioj estas 500 fr.fr., por Britujo 10 ang. ŝil., ktp.

La Estraro decidis, realigante la instruiciojn de la Komitato, entrepreni grandskalan mondan kampanjon por havigi al UEA kiel eble plej multe da apogantoj inter la neesperantistoj. En la landoj, kie ekzistas aliĝinta landa asocio, la kampanjon organizos tiu asocio. En la aliaj landoj la ĉefdelegitoj aŭ perantoj prizorgos la kampanjon. Kompreneble la estraro estas konvinkita ke ĉiu individua membro aktive partoprenos en tiu grava laboro.

Ĉiu apoganto ricevas specialan numeritan ateston pri sia pago. La atestoj estas ĵus presitaj kaj haveblaj en libretoj de po 10 ekzempleroj. Sekve la minimuma kvanto, kiun oni povas mendi, estas unu libreto kun dek atestoj, kies valoro estas 50 ned. gld. Ĉiu mendinto respondecas pri tiu sumo por ĉiu mendita libreto. Detalaj instruicioj pri ĉio rilate la varbadon de Apogantoj troviĝas sur la kovrililo de la libreto kun la atestoj.

Varbu Apogantojn de UEA inter viaj amikoj kaj konatoj-neesperantistoj! Partoprenu amase en la kampanjo! Ĉiu individua membro de UEA havu la celon havigi al la Asocio almenaŭ dek Apogantojn.

Por honorigi la plej agemajn kunlaborantojn en ĉi tiu kampanjo, la Estraro decidis ke ĉiu, kiu varbos 100 Apogantojn, ricevos specialan honoran mencion en la Revuo kaj libropremion en valoro de 50 ned. gld. laŭ sia propra elekto.

El „*Esperanto*” febr. '56).

landoj aŭ rekte al la Administra Oficejo de U.E.A. Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.

La aranĝadon de la ekspozicio prizorgas la Centro de Esporo kaj Dokumentado en Londono kunlabore kun la Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro kaj kun la loka ekspozicia komitato en Strasbourĝ.

(El „*Esperanto*” Febr. 1956)

Erasmus de Roterdamo

eminenta viro kiu interligas Svislandon kaj Nederlandon



Erasmus de Roterdamo

Ĉiu nacio estas fieri pri siaj eminentaj filoj, kaj tio ja ne estas io mallaudinda. Tamen okazos ke nacioj eĉ disputas inter si, se iu eksterordinarulo per sia vivo efektive apartenas al du popoloj. Oni pensu pri Kolombo, naskita italo sed malkovristo en hispana servo. En aliaj kazoj viroj de tia tipo ne kaŭzas disputojn sed estas kiel pontoj inter diversaj nacioj. Al tiuj viroj apartenas Erasmo de Roterdamo, mi neniam aŭdis, ke svisoj kaj nederlandanoj disputis pri tiu viro, kvankam ambaŭ apartenas al lia vivo. En Nederlando li naskiĝis (ĉirkaŭ 1466), tie li kreskis, sed en la svisa Basel li pasigis multajn el siaj plej fruktodonaj jaroj, kaj tie li mortis. Kiel la Reĝino interligas Svislandon kaj Nederlandon, la alta spirito de Erasmo donis komunan kulturan riĉaĵon al ambaŭ landoj, sed ne nur al ili: al tuta Eŭropo. Ridinde estus paroli pri la nacieco de Erasmo, li estis vere supernacia, kosmopolita, li sentis sin mondĉivitano kaj lia lingvo estis nek nederlanda nek svisa, sed la Esperanto de la tiama tempo, la latina lingvo. Erasmo de Roterdamo ĉie estis hejme, kie vivis kleruloj sciantaj la latinan lingvon, kaj lia vivovojaĝo kondukis lin tra Italujo, Francujo, Anglujo. Kial la tiom ŝatis restadi en Basel? Ĉar Basel tiam estis centro de humanisma kulturo, kaj tie li trovis presiston, Froben, kiu kontentigis lin kaj donis al li la atmosferon, en kiu li ŝatis labori. Erasmo estis kvazaŭ ĵurnalisto, li plej multe ŝatis verki kiel eble plej proksime de la presejo aŭ eĉ en ĝi mem, li volis aŭdi la presilon, flari la preskoloron kaj senti malsekan paperon de la presprovaĵoj. Kaj la publiko ŝtorme aĉetis liajn librojn kiel hodiaŭ freŝajn gazetojn, ĉar li estis en la plena aktualeco de sia tempo. Liaj satiraj, kulturkritikaj verkaĵoj, kiel la nemortebla „laŭdo de la stulteco”, liaj „familiaj konversacioj”, lia „manlibro de la kristana batalanto” estis plej ŝatataj, sed por la historio li estis ankoraŭ pli grava pro lia kritiko de la sanktaj libroj, lia purigita eldono de la greka nova testamento, ĉar per tiuj verkaĵoj li multe influis la samtempan teologion kaj kreis la fundamenton de la reformacio. Li tamen ne aliĝis al Luther, ĉar li malŝatis ĉion revolucion kaj volis renovigi la eklezion de supre. Pro tio la Lutheranoj multe kritikis lin, samkiel li ankaŭ ne trovis la aplaŭdon de la katolikoj, kiuj riproĉis al li, ke li mem preparis la reformacion per siaj verkaĵoj. Sed Erasmo ne volis partopreni en la pasioj de tiu tempo, kaj kiam Basel reformiĝis, li translokiĝis al la proksima Freiburg, kiu restis fidela al la malnova kredo. Tamen li revenis al Basel kie li mortis en 1536. Oni hodiaŭ ne plu tre ofte legas la verkaĵojn de Erasmo; en la originalo ilin nur povas kompreni tre malgranda elito, ĉar lia latino estas tre eleganta kaj klasika, tio signifas samtempe malfacila. Sed tamen valoras por ni okupiĝi pri Erasmo, ĉar li estis pli proksima al nia moderna spirito, ol oni povus pensi. Mi jam nomis lian supernaciecon kaj lian malŝaton de konfesia zelo, menciindaj estas ankoraŭ lia malamo de la milito kaj lia kredo, ke la homo estas bona kaj edukebla. Per tio li estas jam proksimumo de Rousseau kaj Pestalozzi. Lia idealo estas literaturo kaj klereco kaj li volis per siaj libroj eduki la homojn al vere kristana kunvivado kun bonaj moroj, sincera kredo, simpleco kaj modereco. Kiu

K.ELI Kongreso en Svedujo

Tuj antaŭ la nunjara UNIVERSALA KONGRESO en Kopenhago.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA kongresos en la suda parto de Svedujo.

De la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto (matene) la anoj, simpatiantoj, interesigantoj estos kune en „Södra Vätterbygdens Folkhögskola”, konata alternejo apud Jönköping.

Temoj, diskutoj, ekskursoj, distraĵoj, promenadoj k.t.p. apartenas al la varia programo de la kongreso.

Jönköping situas en belaj ĉirkaŭaĵoj apud fama lago Vättern.

Prezo de la restado, tranoktoj, manĝoj, ekskursoj estos proksimume 110.- Sv. Kr.

Informoj kaj aliĝilo estas haveblaj ĉe „Keli kongreso '56, Storgatan 7, Örebro, Svedujo.”

Flugfolio por Neesperantistaj Kongresoj

La Informa Fakto de UEA ĵus eldonis flugfoliojn, ĉefe direktitan al la partoprenantoj de internaciaj neesperantistaj kongresoj kaj konferencoj. Tamen ĝi estas bone uzebla ankaŭ por aliaj okazoj. La tekston de la flugfolio prizorgis la Informa Fakto de UEA kaj ĝi estis aprobita de la landaj informaj faktoj. La flugfolio, tre belaspekta, presita en du koloroj, estas verkita en ses lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala kaj sveda. La nacilingvaj tradukojn prizorgis kompetentaj kunlaborantoj de CED, tiel ke ankaŭ tiurilate ĝi estas senproĉa.

Por eldono de la flugfolio Sinjoro Charles Thollet el Maroko donacis la konsiderindan sumon de 80.000 fr.fr. Proksimume same altan sumon kontribuis UEA. La estraro decidis fiksi la prezon de la flugfolio tiel, ke per plena disvendo estu kovritaj ĉiuj preskostoj kaj ekspedaj elspezoj. Sekve 1000 ekzempleroj de la flugfolio kostas 40.— gld. aŭ 4000 fr.fr. aŭ f 4 aŭ egalvaloron de 40.— ned. gld. La flugfoliojn oni mendo ĉe la Administra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam. C. Nederlando.

La Informa Fakto de UEA esperas, ke la landaj centroj de informado mendas plurajn milojn de la flugfolioj kaj vaste utiligos ĝin por distribuo al la membroj de internaciaj konferencoj kaj kongresoj, kiuj en tiu ĉi jaro estos tre multnombraj. Estus ankaŭ dezirinde, ke unuopaj esperantistoj, precipe tiuj, kiuj mem partoprenos neesperantistajn kongresojn kaj konferencojn, havigu al si sufiĉan kvanton da flugfolioj.

La Administra Oficejo ne povos plenumi mendojn de malpli ol 250 ekzempleroj.

La Informa Fakto de UEA atentigas, ke estas ĝia intenco regule eldonadi modernajn kaj aktualajn flugfoliojn, se tiu ĉi unua provo montriĝos sukcesa. Ju pli baldaŭ disvendiĝos kaj disdoniĝos la ĵus publikigita flugfolio, des pli baldaŭ aperos nova per la reenkasigita kapitaletto, kiu formas konstantan eldonan fondaĵon por flugfolioj.

deziras pliprofundigi en Erasmo legu la bonegan libron de la nederlanda historiisto Johan Huizinga, kiu jam aperis en kvin lingvojn. La 4an eldonon en germana lingvo faris la eldonisto Benno Schwabe en Basel.

Arthur Baur.

(Ĉi tiu teksto estis disaŭdigita en la Esperanto-programo de Radio Schwarzenburg la 27an de marto '56).

Tutmonda Kongreso de Infanoj

Infanoj el ĉiuj landoj kunvenos en Kopenhago de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1956 okaze de la Unua Internacia Infankongreso. La kongreson organizas la Loka Komitato de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenos ĉ. 2.000 reprezentantoj el la tuta mondo. La infanrenkontigo havos grandan pedagogian valoron ĝuste tial, ĉar la infanoj interkomprenigos nur per la komuna lingvo Esperanto. Dum unu semajno la etuloj de ambaŭ seksoj kune ludos, kantos, recitos, amuzigos parolante nur la Internacian lingvon. Estas interese menci, ke laŭ la esploroj, kiujn faris la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono, 4 % de la personoj, kiuj parolas hodiaŭ Esperanton, lernis ĝin en la infanaj jaroj.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

(Sekvo de paĝo 29)

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero : 1230.48)

La 19an de marto, S-ro Piron faris prelegon eksterordinare trafan en franca lingvo ĉe „Cercle constructif de la vie sociale” (Konstrua rondo de la socivivo). Ĉiuj Bruselaj esperantistoj ĉeestis. S-ro Piron defendis tre klare la diversajn ecojn de nia afero, en tre entuziasmigita klubo. Pluraj personoj interesiĝis pri Esperanto.

La 26an de Marto: S-ro Swinne aranĝis „Mitulvesperon” en Mitulreĝo-trinkejo. La bongustajn moluskojn manĝis kvazaŭ religie la esperantistoj! Poste ĉi rakontis gajan historion.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiulunde, je 20.15a, en la salono unua-etaĝa: Place du Grand Sablon, 38, Grote Zavel.

Aprilo: (memorige): la 9an: Parolata ĵurnalo; la 16an: Perfekta kurso de S-ro Vander Stempel; la 23an: Skota vespero kun S-ro Wylie (Surprizo!); la 30an: NO-VA SERIO: DISKUTVESPERO dum kiu ni interdiskutos libere pasintajn temojn de

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

Jn 't Duifken (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno: Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
 Ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagĵurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. ilo por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1. Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspulso. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58. Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijk, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiuj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltajo
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
S-ro A. van den Neste, Deurnebaar 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

Brŭo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 31. Ĉiuj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strove, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Malson Joye, Gelmuntstr. 29. Cemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX” 11, Av. du Couronnement,
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaĵ artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj gardenilaro
Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojag-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

UNESKO honorigas Adam Mickiewicz

Okaze de la 100-jara datreveno de la morto de la granda pola poeto Adam Mickiewicz, UNESKO publikigis verkon omaĝe al la memoro de

la monato. Ĉiu sin preparu.

Majo: la 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Perfekta kurso de S-ro Vander Stempel; la 19, 20, 21ajn: Beneluksa kongreso. Ĉiuj al Gento!; la 28an: Amuza vespero organizita de S-ino Weyn.

la fama verkisto. La volumo enhavas kolekton da kontribuajoj de konataj aŭtoroj el diversaj landoj kaj partoj el la ĉefaj verkoj de la poeto.

La verkoj de Mickiewicz estas tradukitaj en multajn lingvojn. Lia mondkonata poemo „Pan Tadeusz” jam aperis ankaŭ en la Internacia Lingvo Esperanto. Nun en Polando estas publikigata la dua eldono de tiu traduko, kiu estas konsiderata kiel unu el la klasikaj verkoj de la Esperanta literaturo.